JEN-BULTENO JEN-BULTENO JEN-BULTENO JEN-BULTENO JEN-BULTENO JEN-BULTENO JEN-BULTENO

NUMERO 8 APRILO 1963

# Haltu!

## atendu! aŭskultu!

mi desegnas

NOVAN KOVRILON

P.I.

JEN

## BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO

SENDU KOTIZOJN AL: STANLEY COHEN, 16 LONG AVE., ALLSTON, MASS., ĈION POR REDAKCIO AL: ALLAN E. FINEBERG, 76 17TH AVENUE, PATERSON, NEW JERSEY; GENERALAĴOJN AL: RICHARD KOLLIN, 30 AVENUE B, NEW YORK 9, N. Y. -- JARABONO: $1.00 AŬ EGALVALORO.

JEN ESTRARO:

RICHARD P. KOLLIN .................... SEKRETARIO
ALLAN E. FINEBERG .................... REDAKTORO
STANLEY COHEN ........................ KASISTO
JOHN F. KOOISTRA ..................... KOMISIITO PRI UNIVERSITATANOJ
HUMPHREY TONKIN ...................... KOMISIITO PRI EKSTERLANDAJ AFEROJ
JONATHAN POOL ........................ KOMISIITO PRI VARBADO

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

ĈU VI DEZIRAS GAJNI MONON DUM VIAJ LIBERAJ MINUTOJ, SEN RISKO ?

KAJ SAMTEMPE DISPONI MODERNAN INFORMFOLION, SEN PAGO ?

SE JES, RIGARDU NIAN PROPONON ! :

"A WORD ABOUT ESPERANTO" ESTAS NOVA, POPULAR-NIVELA INFORMFOLIO POR ĜENERALA DISDONADO. KROM LA INFORMO, ĜI PORTAS MENDILON POR LA HARVARD ESPERANTO CLUB CORRESPONDENCE COURSE. NI SENDOS AL VI, ABSOLUTE SENPAGE, KVANTON DE LA INFORMILOJ, KAJ VI DISDONOS ILIN AL INTERESITOJ PRI ESPERANTO. POR ĈIU PERSONO, KIU MENDOS LA KORESPONDAN KURSON, NI PAGOS AL VI 10 % DE LA KURS-KOTIZO.

AGU TUJ HODIAŬ! VI GAJNOS MONON, VI GAJNOS INFORMILOJN, KAJ VI NE POVOS PERDI !

SENDU VIAJN NOMON KAJ ADRESON AL:

HARVARD ESPERANTO-KLUBO, FAKO W
QUINCY HOUSE, BOX 8
HARVARD UNIVERSITY
CAMBRIDGE 38, MASSACHUSETTS

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

THE KITS ARE READY !

The Kits Are Ready !

the kits are ready !

THE KITS ARE READY !

THE KITS ARE READY !

THE KITS ARE READY !

WHAT KITS? THE ESPERANTO INSTRUCTION KITS!

CONTENTS:

| | |
|---|---|
| TEACH YOURSELF ESPERANTO (CRESSWELL & HARTELY) | $2.75 |
| ESPERANTO PRONUNCIATION RECORD, 45 RPM (FLEGO) | $1.25 |
| ESPERANTO: LINGVO INTERNACIA, 44 PAGES (EICHHOLZ) | .35 |
| ENGLISH-ESPERANTO VOCABULARY, 3,600 WORDS (BEA) | .05 |
| KLM TRAVEL FOLDER (IN ESPERANTO) | |
| 12-PAGE BEAUTIFUL TOURIST FOLDER FROM ANTWERP | |
| RECENT COPY OF "OKCIDENT-GERMANA REVUO" | |
| INTERNATIONAL CORRESPONDENCE BLANK | |
| BOOK LIST (325 TITLES, AVAILABLE IMMEDIATELY IN U.S.) | |
| MEMBERSHIP BLANK FOR BOTH ELNA AND JEN | |
| INSTRUCTION SHEET FOR USE OF KIT | |

TOTAL VALUE ... 4.40

YOURS NOW FOR ONLY $3.25!!

SEND FOR YOURS TODAY! WRITE TO:

JEN
30 AVENUE B
NEW YORK 9, N. Y.

## AL LA LEGANTARO

Kiel jam menciita en la 2a Speciala Raporto de la Sekretario de JEN, deĵoras en posteno de JEN-Bultena redaktoro Allan E. Fineberg, provizore, ekde eksiĝo de antaŭa redaktoro Ken Miner. La sinteno de la Bulteno ne estas ŝanĝiĝinta... same kiel antaŭe, niaj paĝoj restadas malfermataj por uzo de ĉiuj JEN-anoj kiuj volas sin esprimi skribe kaj verke en la Bulteno. Verkemuloj estas invitataj al ni helpi dum la venonta periodo, por ke ni ĉiuj ĝuu la fruktojn de komuna helplaboro, en atmosfero harmonia kaj libera.

* * * * * * * * *

### ...SED PRECIPE FALSAĴOJ KAJ BLUFOJ!

En Belarto I aperis artikolo "Ludadi sur vulkano," de s-ano G. P. Makkink; la artikolo estis konsekvenco de novaperinta revuo "The International Language Review." Laŭ s-ano Makkink, tiu unua kajero de la kvaronjara revuo estis nur tridekpaĝa kaj enhavis 17 artikolojn en sep lingvoj: la angla, Interlingue, Interlingua, Monde lingua, Ido, Intersistemal kaj Latine sine flexione.

Depost tiam la "International Language Review" kreskadis. La numero 28 de ILR (kiel mi ĉiposte nomos ĝin) enhavas 82 paĝojn. Eĉ pli grave (kaj eble danĝere) ĝi enhavas la unuan parton de triparta simpozio: "Is Esperanto the Answer to the World Language Problem?"

Verŝajne la fina respondo estos "Ne!" Ne pro iu manko de la lingvo Esperanto mem; nur pro tio, ke la plej granda parto el la kontribuantoj al tiu revuo estas mem aŭtoroj aŭ kredantoj de la aliaj diversaj lingvo-projektoj. Mi nur menciu, ke en tiu unua kajero de la simpozio aperis tri artikoloj en Ido, unu en Intersistemal, tri en Occidental (Interlingue), tri en Interlingua, kaj nur unu en Esperanto — kaj tio estis nura represaĵo.

La simpozio komenciĝas kun tiu represita artikolo — la konata ĉefartikolo de la revuo "Esperanto" por julio-aŭgusto 1962, "Falsaĵoj, Antaŭjuĝoj, Ignorado, Blufoj..." de Prof.-D-ro Ivo Lapenna. Tuj post tiu artikolo aperas rebato (se oni povas nomi ĝin tiel) de Jens Carstensen, dana Occidentalisto. Kaj jen komenciĝas la polemiko!

La artikolo de Carstensen estas, verŝajne, la ĉefartikolo de la kontraŭ-esperantistoj. Des pli malbone, ke ĝi entenas precipe falsaĵojn kaj blufojn! En tripaĝa artikolo en Occidental, kun posta traduko en la anglan lingvon, S-ro Carstensen montras sian kleron rilate al Esperanto per tiaj diraĵoj, kiaj la jenaj:

> "...Lapenna knows that a truly reasonable and scientific informative labor would make impossible the further expansion of Esperanto, because it is an obsolete schematic language which has in our days a very slim chance of enduring."
>
> "He regrettably overlooks the fact that UEA has only about 30,000 members ...In its 75 years of existence, Esperanto has acquired only these 30,000 adherents..."

KAJ SIMILAJ. EKZEMPLE, LI RESPONDAS AL LA LAPENNA-ARGUMENTO, KE ANGLA-LINGVANOJ NE POVAS KOMPRENI NATURALISMAN LINGVON "TUJ" PER LA ARGUMENTO, KE ILI ANKAŬ NE POVAS TUJ KOMPRENI ESPERANTON (KVANKAM LI BONE SCIAS, KE ESTAS SOLE LA NATURALISMAJ LINGVOJ, KIUJ BLUFAS PRI TIU "TUJA KOMPRENEBLECO").

ANKAŬ APERAS ARTIKOLOJ DE CARL A. ROSTROM, IDISTO KIU ĈI-OKAZE IOMETE BATALAS PER ESPERANTO (NUR PRO TIO, KE LA BATALO FARIĜIS INTER LA "SKEMATIKAJ" KAJ LA "NATURALISMAJ" LINGVOJ), SED KIU DISFALAS EN KOTAN DISKUTADON PRI LA "FINANCAL INTERESTI"; ARTURO ALFANDARI, AŬTORO DE NEO; REV. JOSEPH HOELLRIGL DE LA AMERICAN INTERLINGUA SOCIETY; KAJ TRO MULTAJ ALIAJ. SED, POR SENKULPIGI LA ILR KAJ ĜIAN REDAKTORON, MI ANKAŬ MENCIU, KE APERAS "DEFENDAJ" ARTIKOLOJ DE MONTAGU C. BUTLER, E. JAMES LIEBERMAN, DAVID RICHARDSON KAJ J. C. WELLS.

EN LA DUA PARTO DE LA SIMPOZIO (ILR #29-30) PROF.-D-RO LAPENNA KOMENCAS LA DISKUTADON FARE DE ARTIKOLO EN LA ANGLA LINGVO, KIUN AMPLEKSAS DEKDU PAĜOJ. ALEXANDER GODE (DE INTERLINGUA) DEVOJIĜAS KUN ARTIKOLO PRI SIAJ KREDOJ PRI LA LINGVO-PROBLEMO (VERŜAJNE LI NE KREDAS AL LA "INTERNA IDEO" KAJ TIAM S-RO CARSTENSEN DENOVE KOMENCAS FALSI KAJ BLUFI. NUR UNU EKZEMPLO: J. C. WELLS MENCIIS, KE LA OCCIDENTALA VORTFARADO ESTAS NEREGULA. TIAL S-RO CARSTENSEN RESPONDAS, NEK LA ESPERANTA! POR MONTRI TION, LI NOMAS KELKAJN NEREGULAJN PARENCAJN VORTOJN: PREMI, ESPRIMI, IMPRESIMONTRI, DEMONSTRI - INDUKO, DEDUKTO, PRODUTO! ONI DEVUS DANKI S-RON CARSTENSEN PRO TIO — NENIAM ANTAŬE MI SCIIS, NENIAM ANTAŬE IU AJN ESPERANTISTO SCIIS, KE TIUJ VORTOJ INTERRILATIĜAS!

KAJ TIEL PLU, KAJ TIEL PLU. LA EKZEMPLAJ FALSAĴOJ KAJ BLUFOJ ESTAS MULTAJ; MI TUTE NE POVUS ENLISTIGI ILIN ĈI-TIE.

APARTE DE LA SIMPOZIO, LA ILR ENHAVAS MULTAJN INTERESAJN ARTIKOLOJN PRI DIVERSAJ TEMOJ. ĈIU EKZEMPLERO ENTENAS NOVAĴOJN EN INTERLINGUA; REKLAMOJN PRI INTERLINGVISTIKAJ TEMOJ; RECENZOJ DE LIBROJ KAJ DISKOJ; RECENZOJN DE INTERLINGVISTIKAJ GAZETOJ (EĈ RECENZON DE "JEN-BULTENO"); KAJ ION PRI REFORMADO DE LA LITERUMADO DE LA ANGLA LINGVO (FONETIKA ANGLA — TIO ESTAS DIALEKTO UZATA DE ANALFABETOJ).

ENTUTE LA ILR ESTAS INTERESA REVUO POR TIUJ, KIUJ INTERESIĜAS PRI LA LINGVISTIKO. BEDAŬRINDE, KE ĜI ENHAVAS TIOM DA FALSAĴOJ KAJ BLUFOJ. SE NUR NI ESPERANTISTOJ — KAJ PRECIPE NI JUNAJ ESPERANTISTOJ — POVUS REFORMIGI ĜIN...

— DONALD J. HARLOW

* * * * * * * * *

A L I Ĝ U A L J E N

A L I Ĝ U A L E L N A

A L I Ĝ U A L K E A

A L I Ĝ U A L E M A

A L I Ĝ U A L U E A

# Vespero ĉe l'opero

La grandegaj oraj kurtenoj de la Metropolitan Oper-domo leviĝis kiel kutime. Oni prezentas Boris Godunov-on de M. P. Mussorgski. Estas la sceno de la kronado de la Caro. La muziko ludiĝas, la nobelaro, la kamparano, kaj la soldatoj jam staras propraloke. Tute kiel ofte antaŭe.

Tamen, ĉi-tempe estas io ja nesama. Rigardu tien, ĉe la plank-lumoj! Ĉu vi ne vidas? Unu el la soldatoj estas Esp-isto -- kaj ne nur Esp-isto, sed Jen-ano! Sed mi anticipas. Ni malantaŭeniru kelkhore.

Je la sesa kaj duona mi prezentis min ĉe la malantaŭa pordo por peti roli kiel "kromulo" ĉe l'opero. Oni aprobis kaj enkondukis min. Malsupren, malsupren mi iris. En eta ĉambro estas la kromulejo. Aliulo kaj mi estis la unuaj. La estro rigardis nin kaj ordonas: "Vi, estu papo! Vi, ruĝa soldato kun lipharoj kaj pintbarbo!" Kaj tiel estis.

Unue, mi senvestiĝis min. Due, mi devis ŝminkiĝi. La ŝminkisto, vidante min kaj miajn klopodojn, ridis.

"Do, novulo! Venu kun mi. Eksidu tien ĉi antaŭ la spegulo."

Dum li ŝminkas min li parolas.

"Estas via unua fojo, ĉu?"

"Jes."

"Bone. Sciu ke mi malamas kromulojn." (Ĉiam ridetante) "Kaj precipe novulojn!".

Por mi estis, komprenenble, bonega komenco. Baldaŭ mi havas belan kvazaŭ-sunbruniĝecan haŭtkoloron. Miaj okuloj ekbrilas kaŭze de la ŝminko. Tiam li diris:

"Nun ni prizorgu vian nazon! Iomete tien kaj 'voila!' Poste krevigi la vangojn...Nun kelkajn strekojn por maljunigi vin." Finfine, la ŝminkisto, pinto, bone rigardas min: "Kia bela malbelaĵo!" Vere mi ne rekonis min jam. (Pli poste mi efektive havus penadojn provi al miaj konatoj ke tiu, en bildo kiun oni prenis de mi, estas ja mi. Oni ne kredus min.)

La tempo malfruiĝas. Oni devas rapidi. Mi reeniris la etan ĉambron. Nun tie estis granda aro da kromuloj. Kie la kostumo? Oni helpis min vesti kiel soldato. Mi ricevis la lipharojn kaj pintbarbon. Kaj mi estis preta.

"Do," oni kriis, "Supren sur la scenejo por antaŭprovi!" Estis antaŭprovo dufoje, kaj tiam ree malsupren. Oni atendis la komenciĝon de la opero.

Post unu horo estas mia sceno. La aliaj "soldatoj" prenis siajn lokojn. Komenciĝas la muziko. La tamburoj, sonoriloj, kaj sonorigaĵoj sonas. Kaj nun granda "susuro" la kortegoj svingiĝas malfermite malantaŭ mi, montrante la placon Kremlin pretan por la kronado de la Caro Boris. Kaj tie, dorsflanke je la spektantaro, staras, glav-enmane, la plej nova rekruto en la

CARA ARMEO. MI TIMIS KE MI NUR FALU EN LA ORKESTREJON, KAJ KE MI NE FORGESU MIAN "ROLON". SED TIUJ NE OKAZIS, DANKINDE.

POSTE-TIO TUTE DAŬRIS NUR MINUTOJN-MALSUPREN IRI KAJ FORVIŜI LA ŜMINKON. MIA REKOMPENCO? TRI DOLAROJ KAJ "ORO MONERO" MEMORIGACELA. KIEL ONI DIRAS: NUR EN AMERIKO POVUS TIA OKAZO REALIĜI...

JOSEPH I. BLITZ

* * * * * * * * *



## PLEJ GRAVA ANONCO

NOVA ORGANIZAĴO POR VI, SE VI ESTAS ESPERANTISTO KIU SENĈESE KAJ SENREZERVE EN ĈIU ESPERANTO-RONDO SATAS PRIMOKI "LA KARAN LINGVON". SE VI EMAS RIDI KIAM ONI PRIDISKUTAS LA "INTERNAN SPIRITON" DE LA LINGVO, ENTUTE, SE VI MALŜATEGAS ESPERANTON, KIEL MALŜATEGAS ĜIN MULTAJ SAMIDEANOJ (SE ONI POVAS JUĜI TIUN LAŬ LEGADO DE RECENZOJ, KTP.) NI HAVAS ORGANIZAĴON POR VI! KOMITATO INTERNACIA POR ABOLIGO DE LINGVO ESPERANTO ĴUS FONDIĜIS, KAJ ĈIUJ MALSAMIDEANOJ RAPIDAS POR ALIĜI AL ĜI.

KIALE ESTABLIĜIS POR PREZENTI LA FAKTOJN AL LA ESPERANTA PUBLIKO EN TUTE OBJEKTIVA MANIERO. NI ĈIUJ SCIAS, KE LINGVO INTERNACIA KIEL ESPERANTO NENIAM ESTOS GRANDSKALE UZATA INTER LA MONDPOPOLO. TIAL, NI LABORAS ĜIS PLEJ BONA CELO: ABOLIGO DE LA LINGVO ESPERANTO, TUTE KAJ TUJE.

SE JA NI ESTAS TUŜINTA VIAN NEVERDAN KORON, SKRIBU AL NI POR PETI INFORMOJN PLUAJN. SKRIBU ESPERANTLINGVE; NUR PER TIU FILINGVAĈO ONI POVAS INTERKORESPONDADI KUN DIVERSLANDANOJ EN TRE DISAJ LOKOJ.

SKRIBU AL: D-RO IO SENĜENA 21 ESPERANTO-STRATO ZAMENHOFVILLE, ESPERANTUJO

___AJEFO

* * * * * * * * * *

2º CONGRESO MEXICANO
ESPERANTO
DICIEMBRE 26-28
GUADALAJARA, JAL.
1963

## ALIA FORMO DE ALIANCO POR LA PROGRESO?

Kion vere signifas "Nordameriko" en la titolo de JEN? Ni ne estas difininta tiun vorton sufiĉe precize pro bona kialo. La landlimoj dum ĉi-tiu kreskanta periodo de JEN, devas esti malklaraj por pli bone organizi la junajn Esperantistojn en landoj kaj insuloj kiuj ne apartenas al la Nordamerika kontinento. Kiam JEN ekhavos membrojn en kelkaj sudkontinentaj lokoj, ni povos plifortigi la rondojn, klubojn, ktp en tiuj lokoj. Poste, ili estos sufiĉe fortaj por organiziĝi inter si mem (aparte de JEN) kaj ili povos fondi junularan sekcion, ekze., tutkariban. Tiu ideo estas ankoraŭ en embria stato kaj povos ŝanĝiĝi diversforme.

Sufiĉas diri ke nun JEN havas membrojn en Puerto Rico. Ankaŭ varbada kampanjo antaŭenglitas en Costa Rica kaj Meksikio. Ni kontaktis klubojn en Mexico kaj Guadalajara. Multaj gejunuloj aliĝas al la Esperantista Meksikia Asocio, kaj ni esperas ke multaj aliĝos al JEN.

* * * * * * * *

## LA LINGVA SITUACIO EN FINNLANDO

Ĉiuj poŝtmarkoj el Finnlando surhavas la du vortojn: Suomi kaj Finland. Tiuj estas la du nomoj de la lando. Suo tradukiĝas kiel 'marĉo,' kaj la sveda vorto fin rilatas kun angla vorto fen. Do, Suomi (aŭ, pli ĝuste, laŭ antikva nomo Suomenmaa) kaj Finland komence signifis ne 'Finn-lando' sed 'Marĉ-lando.' Tamen, dum multe da jarcentoj oni uzas la vorton Finnoj (aŭ Fenni) por nomi la popolon de tiu norda lando. Sed kial ekzistas du nomoj? Finnlando (aŭ Suomio) havas du oficialajn lingvojn: finnan kaj svedan. Pro tio, urboj kaj eĉ stratoj kutimas havi du nomojn. Tiuj nomoj povas esti similaj — ekzemple, la ĉefurbo, Helsinki (finna)/ Helsingfors (sveda), aŭ la strato Aleksanterinkatu/Alexandersgatan. (Similaĵoj estas ofte rezultato de depruntaĵoj.) Tamen, la nomoj ankaŭ ofte malsimilas — ekzemple, la antaŭa ĉefurbo Turku/Åbo, aŭ la strato Hämeentie/Tavastvägen. Eksterlandanoj nuntempe kutimas uzi la finnan "Helsinki" sed la svedan "Finnlando."

La historio de la lingva situacio en Finnlando estas interesa. Longa, bataleca, kaj malfacila vojo estis necese por atingi agnoskon de la finna lingvo. Dum preskaŭ 650 jaroj Finnlando estis parto de la Sveda Reĝolando, do nur la sveda lingvo estis oficiala. La finna restadis neskribite ĝis kiam, en 1548, Mikael Agricola, la "patro de finnlingva literaturo," tradukis finnen la Novan Testamenton. Li ankaŭ skribis abocolibron, por ke oni lernu legi. En 1761 Henrik Gabriel Porthan, profesoro ĉe la Universitato de Turku, verkis traktaton pri finna popolpoezio kaj literaturo — sed klerece, latinlingve: Dissertatio de Poesi Fennica.

La vere finnlingva (aŭ, pli ĝenerale, por nacia) movado ne komenciĝis ĝis la deknaŭa jarcento. En 1809 Finnlando fariĝis aŭtonomia parto de la Rusa Imperio, kaj en 1819 oni translokiĝis la ĉefurbon el Turku al Helsinki. La pli altaj klasoj de homoj restis svedparolantaj. Ili daŭris havi potencon eĉ preskaŭ ĉiuj verkantoj estis "svedofinnoj." (La vortoj "svedofinnoj" kaj "finnofinnoj" havas lingvistecan signifon; ili ĉiuj estas

LANDANOJ DE FINNLANDO.) JOHAN LUDVIG RUNEBERG, LA NACIA POETO, SKRIBIS SVEDLINGVE SIAJN VERKOJN, KVANKAM LI SCIIS LA FINNAN. LIAJN SVEDAJN VORTOJN DE LA NACIA HIMNO (KIU NE ESTAS "FINLANDIA") ONI FINNEN TRADUKIS. SED TRADUKI POEMOJN ESTAS ĈIAM MALFACILE. ZACHARIUS TOPELIUS SKRIBIS SVEDE SIAJN HISTORIETOJN. TAMEN LI ANKAŬ KOLEKTIS MULTE DA ANTIKVAJ RUNOJ (BALADOJ) EL TRADICIEMAJ RUNOKANTISTOJ. TIUN VERKADON FINIS ELIAS LONNROT, KIU EN 1835 PUBLIKIGIS LA UNUAN ELDONON DE LA NACIA EPOPEO *KALEVALA*. ĈIRKAŬ 1840 LI ELDONIS DU ALIAJN GRAVAJN LIBROJN: *KANTELETAR* (LA KANTELE ESTAS ANTIKVA KORDINSTRUMENTO), KIU ESTAS KOLEKTAĴO DE BELAJ POPOLKANTOJ; KAJ KOLEKTAJON DE FINNAJ PROVERBOJ. REVIZIITA ELDONO DE LA *KALEVALA* APERIS EN 1849. KAJ ANKAŬ, DUM DEKOK JAROJ, LONNROT VERKADIS FINNAN VORTARON, KIU APERIS EN 1880. LONNROT KREIS MULTAJN NOVAJN VORTOJN. TAMEN LI PREFERIS PAROLI SVEDE. J. V. SNELLMAN ESTIS INTELEKTA GVIDANTO DE LA MOVADO. LI ELDONIS LA UNUAN FINNLINGVAN ĴURNALON. LONNROT NUR SONĜADIS KAJ ESPERADIS, KE ONI AKCEPTU LA FINNAN LINGVON. SNELLMAN VIGLE BATALADIS — OFTE SVEDLINGVE — PRO TIU CELO.

EN 1841 ONI INSTRUIS LA FINNAN LINGVON EN LA ELEMENTAJ LERNEJOJ, SED INTER 1850 KAJ 1860 NUR PRI-RELIGIAJN KAJ PRI-TERKULTURAJN LIBROJN ONI PERMESIS ELDONIĜI EN FINNA LINGVO. EN 1870 APERIS LA "NACIA ROMANO," *SEITSEMAN VELJESTA* (SEP FRATOJ), DE ALEKSIS KIVI ('ŜTONO'), KIES VERA NOMO ESTIS STENVALI. LI ESTAS ANKAŬ LA "PATRO DE LA FINNA TEATRO," KIU NUN ESTAS VIGLEGA. SED DUM LA VIVO ONI MULTE KRITIKIS LIN ĈAR LI SKRIBIS FINNLINGVE; KAJ LI MORTIS, MELANKOLIEGE, EN 1872, KIAM LI ESTIS NUR 37-JARAĜA.

DUM LA DUA DUONO DE LA JARCENTO VIVIS ALIAJ GRAVAJ AŬTOROJ, PRECIPE JUHANI AHO. LA NACIA MOVADO ESTIS TIAM TRE VIGLA. ANALFABETECO MALPLIIĜIS, KAJ HODIAŬ APENAŬ EKZISTAS.

EN 1902 LA FINNA LINGVO RICEVIS OFICIALAN EGALECON KUN LA SVEDA. UNU TAGON EN 1906 MULTAJ MILOJ DA SVEDOFINNOJ FINNIGIS SIAJN NOMOJN. EN MULTE DA OKAZOJ LA FINNA NOMO ESTIS ORIGINALA KAJ ESTIS SVEDIĜINTA. LATINECAJ NOMOJ, KIEL SIBELIUS, ESTIS AKCEPTITAJ KIEL FINNAJ. EN 1917 FINNLANDO DEKLARIS SIAN SENDEPENDECON, KAJ EN 1919 KREIS KONSTITUCION, REDEKLARANTE LA OFICIALECON DE LA DU LINGVOJ. LA LINGVA AKTO, EN 1922, ENHAVIS DETALOJN PRI LA AFERO, ĈAR EKZISTAS SVEDAJ KAJ FINNAJ INTERPAROLUMOJ. EN LA ALAND-INSULOJ, INTER SVEDUJO KAJ FINNLANDO, ONI UZAS NUR LA SVEDAN LINGVON, KAJ EĈ NE INSTRUAS LA FINNAN. (LA ALANDANOJ INSISTAS, KE ILI PAROLIS PLI KOREKTI OL LA STOKHOLMANOJ! LA SVEDPAROLANTOJ EN FINNLANDO PAROLAS PER FINNECA AKCENTADO, NE MUZIKEME, KIEL EN SVEDUJO.) EN FINNLANDO MEM, FINNPAROLANTAJ INFANOJ DEVAS STUDI LA SVEDAN, KAJ SVEDPAROLANTAJ INFANOJ LA FINNAN. NENIU EL LA DU ESTAS FREMDA LINGVO. EN LA ALTLERNEJOJ ONI STUDAS FREMDAJN LINGVOJN, PRECIPE GERMANAN KAJ (NUN) ANGLAN.

PRO MANKO DA KRESKO, LA SVEDPAROLANTARO RELATIVE MALKRESKIS, KAJ NUN ESTAS NUR NAŬ PROCENTO DE LA FINNLANDA POPOLO. PRO TIO, MULTAJ FINNPAROLANTOJ DEZIRIS, PRECIPE DUM LA JARDEKO ANTAŬ LA MILITO, KE ONI NE DEVU LERNI LA SVEDAN LINGVON SED ANSTATAŬE PASIGI PLI DA TEMPO LERNADANTE FREMDAJN LINGVOJN, KIEL LA ANGLAN. DUM LA MILITO (AŬ MILITOJ) KONTRAŬ SOVJET-UNIO, ĈIUJ FINNOJ ESTIS FRATOJ. POST LA MILITO LA LINGVA KONFLIKTO NE ESTIS TIOM FORTA OL ANTAŬE. SED LA PROBLEMO ŜAJNAS NE ESTI SOLVITA. LA SVEDLINGVAJ ĴURNALOJ OFTE HAVAS ARTIKOLOJN PRI ĜI. ILI DIRAS, PRAVE, KE LA SVEDA LINGVO ESTAS PONTO INTER FINNLANDO KAJ LA ALIAJ SKANDINAVAJ LANDOJ, ĈAR LA FINNA ESTAS NESKANDINAVA KAJ EĈ NE-EŬROPA LINGVO. FAKTE, PERE DE LA SVEDA, ĜI PRUNTEPRENIS MULTAJN EŬROPAJN VORTOJN. (NUN MULTE DA ANGLAJ VORTOJ APERAS

KIEL!


EN LA FINNA LINGVO.) SED ANKORAŬ OKAZAS, KE ONI IRAS EN VENDEJON, DEMANDAS ION SVEDLINGVE, KAJ RICEVAS FINNAN RESPONDON: "SUOMESSA PUHUTAAN SUOMEA," KIU SIGNIFAS, "EN FINNLANDO ONI PAROLAS FINNE." KAJ ESTAS TRE MALAGRABLA AFERO, KIAM SVEDOFINNO KAJ FINNOFINNO RIFUZIS UZI UNU EL LA DU LINGVOJ INTER ILI, KVANKAM ILI AMBAŬ KONAS LA DU. MI NE SCIAS, ĈU TIO ANKORAŬ OKAZAS.

POST LA DUA MONDMILITO KRESKIS LA STUDADO DE LA ANGLA LINGVO KAJ MALKRESKIS TIO DE LA GERMANA. POST PLURAJ JAROJ REVIVIĜIS INTERESO PRI LA GERMANA. TIO NE OKAZIS JE LA FRANCA. EKZISTAS ANKAŬ ESPERANTO-MOVADO EN FINNLANDO, KIEL EN MULTAJ ALIAJ LANDOJ.

— ELLEN A. LEWIS

* * * * * * * *

## EN WHISTLETHORP INAŬGURIĜIS NOVA ZAMENHOF-STRATO




KE LA LASTATEMPA UNIVERSALA KONGRESO EN LA MONDKONATA FORNFABRIKA URBO WHISTLETHORP LASIS POST SI DAŬRAJN EĤOJN PRUVAS FOTO, (VIDU FLANKE) KIU ĴUS ATINGIS MIN. DANK'AL INICIATO DE LA TIEA ESPERANTO-KLUBO, ESTAS NUN EN WHISTLETHORP STRATO KIU PORTAS FIERE LA NOMON 'ZAMENHOF STREET'.

POST PLURJARA KLOPODADO, KONVINKI LA URBAN KONSILANTARON PRI LA VALORO DE NIA KARA LINGVO, (INTERALIE PER KANTADO DE LA HIMNO DUM KUNSIDO DE LA KOMITATO POR KLOAKOJ KAJ RUBKOLEKTADO) VENIS SUBITE KAJ NEATENDITE LA FINA VENKO. LA STRATA NOMTABULO ESTIS ALFIKSITA DUM KORTUŜA INAŬGURA CEREMONIO, JE LA TRIA MATENE, SABATON 29-AN DE DECEMBRO 1962. LA URBESTRO BEDAŬRINDE NE POVIS ĈEESTI. MALLONGAN PAROLADON PRI LA LINGVA PROBLEMO FARIS (EN ESPERANTO) PREZIDANTO DE LA KLUBO, S-RO BERT THUD, KIU RICEVIS ENTUZIASMAN APLAŬDON NE NUR DE LA KVAR ĈEESTANTAJ KLUBANOJ, SED ANKAŬ DE DU LABORISTOJ HEJMENIRANTAJ POST SIA FORNFABRIKA LABORO. POSTE OKAZIS FESTA KUNVENO, DUM KIU NIAJ SENLACAJ SAMIDEANOJ FARIS PLANOJN POR SIA NOVA AMBICIA ENTREPRENO - LA PROVIZO DE TABULO KUN ESPERANTA TEKSTO SUPER LA PORDOJ DE ĈIU PUBLIKA NECESEJO EN WHISTLETHORP.

NIA TUTMONDA LEGANTARO ESTAS PETATA SENDI GRATUL-KARTOJN, POR MONTRI SIAN DANKEMON, AL LA ESPERANTO-KLUBO DE WHISTLETHORP. MI VARME GRATULAS LA VIGLAJN SAMIDEANOJN, KAJ ESPERAS KUN ILI, KE LA ENLOĜANTOJ DE LA IAMA GASWORKS ALLEY BALDAŬ ALKUTIMIĜOS AL TIES NOVA NOMO.

(ARTIKOLO REPRESITA EL "KIAL NE?" — MARTO-APRILO, 1963.)

REKLAMO

POR FRATECA MONDO, FRATECA RELIGIO

NI HAVAS DIVERSAJN KREDOJN PRO TIO, KE ĈIES PRAPATROJ NEDUBANTE AKCEPTIS LA KREDON DE LA KOMUNUMO KIE ILI HAZARDE LOĜIS. NI ESTAS PROTESTANTOJ, KATOLIKOJ, MAHOMETANOJ, AŬ ALIAJ SEKTANOJ PRO TIO, KE, EN NEMATURA KAJ IMPRESIĜEMA INFANAĜO, NI NIAVICE NEDUBANTE AKCEPTIS LA KREDON DE NIA FAMILIOJ. NI AKCEPTIS FAMILIAN TRADICION, KAJ TUTE NE ELEKTIS INTELIGENTE LAŬ LA RELATIVAJ KVALITOJ DE LA DIVERSAJ SEKTOJ.

MULTAJ ESTAS LA MALBONOJ DE LAŬSEKTA DIVIDIGO: ĈIU SEKTO ELSPEZAS KVANTEGOJN DA TEMPO, ENERGIO, KAJ MONO POR DEFENDI KAJ DISVASTIGI SIAJN PROPRAJN OPINIOJN, NE POR SERĈI LA VERON KAJ SERVI UNUOPULOJN KAJ KOMUNUMOJN. SEKTOJ FENDAS KOMUNUMOJN, NACIOJN, KAJ LA MONDON EN MEMEMAJN GRUPOJN, KIUJ MALTRANKVILIGAS LA SOCION KAJ MALFACILIGAS LA KUNLABORADON. LAŬSEKTAJ PREFEROJ KAJ ANTAŬJUĜOJ INFLUAS LA POLITIKON, LA EDUKADON, LA MEDICINON, KAJ ALIAJN FAKOJN. NI PREFERAS "NIAN PROPRAN SPECON," ĈU AŬ NE ĜI ESTAS MALPLI INDA OL ALIAJ. MANIPULISTOJ ALVOKAS LA ANTAŬJUĜEMON KAJ METAS UNU GRUPON KONTRAŬ ALIAJN. TIO ESTIGAS KAJ DAŬRIGAS VASTAN SUSPEKTEMON, ĴALUZON, MALAMIKEMON, KAJ TIMON.

GRANDAJ ESTAS LA BENOJ DE LA FRATECA RELIGIO: ĜI DONAS INSPIRAN SENTON DE VASTA KUNECO — SENTON DE UNUECO KUN LA TUTA HOMARO. MANKAS AL ĜI LA SUPERSTIĈOJ KAJ DIFEKTEMAJ KUTIMOJ HEREDATAJ DE LA SEKTOJ JAM DE LA PRATEMPOJ ANTAŬ LA CIVILIZO. EBLAS AL ĜI LIBERE ELEKTI DE IU AJN RELIGIO KAJ DE IUJ AJN NERELIGIAJ FONTOJ — EBLAS UZI ION AJN UTILAN. DE ĈIES TRAVIVOJ ĜI POVAS ĈERPI. ĜI ESTAS EKSPERIMENTEMA KAJ ADAPTIĜEMA.

KLERAJ, KONSCIENCAJ SEKTANOJ JA RIFUĜAS. KIAM ILI UZAS LA EBLON KOMPARI SIAJN KREDOJN KAJ KUTIMOJN KUN LA PROPONOJ DE LA FRATECA RELIGIO, ILI VIDAS KE ŜANĜO ESTAS BEZONATA. INTELIGENTAJ, KONSCIENCAJ SEKTANOJ DE LONGE MALKONTENTAS PRO LA PLEJ RELIGIAJ, DIFEKTEMAJ ECOJ DE SIAJ SEKTOJ, SED ILI NE SCIAS KIEL RIFUĜI DE TIUJ SEN FORLASI ENTUTE LA ORGANIZITAN RELIGION. KLERAJ, KONSCIENCAJ, KURAĜAJ SEKTANOJ ŜANĜON FARAS, LAŬVOJE AL PLI "SUPERECA" RELIGIO.

SE INTERESAS VIN LA FRATECA RELIGIO, KIU PROPONAS UNU RELIGION POR ĈIUJ, INFORMIĜU ĈE

JOE ARNOLD
1737 CAMBRIDGE STREET
CAMBRIDGE 38, MASSACHUSETTS, USONO

## RAPORTO DE RONDO I

Dimanĉon, la 31an de marto, okazis festeto de la JEN Rondo I (Novjorko). Ĉeestis proksimume 20 personoj. La afero enhavis, krom bieron kaj babiladon, iujn kulturajn ecojn.


Joseph Blitz kaj John Kooistra rolis en teatraĵeto el la Ŝekspira dramo "Hamleto." Tutcerte, ili sperte majstris siajn rolojn. La traduko de "Hamleto" uzita estis tiu tradukita de Zamenhof. Post la teatraĵo oni aplaudis multe. Plue, oni surbendigis la tutan aferon.

La audo de surbendigitaj kantoj estis alia ĝuigaĵo. Tri viroj kaj unu fraulino kantis kelkajn kantojn antaŭ la festo kaj surbendigis ilin. La kantoj inkluzivis "Tagiĝon," "Valsu Matildon," ("Waltzing Matilda"), "Jen Mia Mano" (trinkkanto), "Ĉu Vi Tre Ŝatas la Rok-n-rol," kaj "Adiaŭ Vin" ("Aloha Oe"). Kia spertaĵo estis aŭdi tiujn ĉi.

Krom anoj de la rondo mem, ĉeestis gastoj el universitatoj Harvard kaj Yale kaj uloj el aliaj lokoj. Fakte, unu gasto ne povis paroli angle — nur esperante. Ĉi tiu gasto estis en bona ĉirkauaĵo ĉar la nura lingvo parolata estis "nia kara lingvo."

— James May

* * * * * * * *



"La pasejo...al vraca"
(Foto represita el "Kial ne?")

### KIU VOLAS ESTI JUNULARA DELEGITO?

La reto de delegitoj de UEA estas institucio vere unika en la mondo. La delegitoj estas kvazaŭ konsuloj Esperantistaj, kiuj plenumas plej diversajn servojn: ili helpas al geesperantistoj vojaĝantaj tra iliaj landoj; ili donas al la esperantistaro pri lokaj cirkonstancoj ĉiuspecaj ktp.

Ĉiu membro de UEA rajtas uzi la servojn de la delegitoj laŭ sia bezono, kaj dum multaj jaroj la aro da delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj donis helpon al miloj da geesperantistoj en la tuta mondo.

Je la nuna momento estas 3,150 delegitoj de UEA en diversaj partoj de la mondo. Ĉi tiu nombro inkluzivas 48 delegitojn de kategorio — junularajn delegitojn.

Ĉar la junularaj delegitoj estas la aparta respondeco de TEJO, kaj ĉar ili povas bone servi al la praktika uzo de Esperanto flanke de la junularo, la estraro de JEN forte petas al ĉiuj siaj anoj:

**ANKAŬ VI FARIĜU JUNULARA DELEGITO!**

## RECENZO: "MALSATA ŜTONO" DE RABINDRANATH TAGORE

TRADUKITA DE L. SINHA --

NE ESTAS NECESE REFOJE RECENZI ĈI-TIUN FAMAN LIBRON KIU JAM ESTIS MULTE LAŬDATA FARE DE LA EMINENTULOJ DE ESPERANTUJO, SED ĈAR ILI ESTAS SPERTULOJ, MI DEZIRAS PRITRAKTI ĜIN EL LA VIDPUNKTO DE NOVA ESPERANTISTO. MI TREEGE ĜUIS LA LEGADON DE "MALSATA ŜTONO" KAJ MI KONSILAS AL ALIAJ GELERNANTOJ, KE ILI LEGU ĜIN.

LA LIBRO ESTAS LA UNUA EN LA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO PER KIU UEA DONAS SIAN APOGON AL LA GRANDA PROJEKTO PRI LA RECIPROKA APREZADO DE LA ORIENTAJ KAJ OKCIDENTAJ KLUTURAJ VALOROJ. TIU ESTAS ANKAŬ PROJEKTO DE UNESCO.

MALGRANDA, SED ANIMOTUŜANTA PRITRAKTAĴO DE LA VIVO DE TAGORE, KIU ANKAŬ ESTIS VERA UNIVERSALISTO KAJ LABORIS POR LA UNUIGO DE LA HOMARO, POSTSEKVAS LA SEP RAKONTOJN. MI OPINIAS, KE PRO TIO, KE LA LIBRO HAVAS, KIEL ANKAŬ ESPERANTO, UNIVERSALECAN KVALITON, ĈIU SAMIDEANO FIERUS POSEDI ĜIN.

LA SEP RAKONTOJ TRADUKIĜIS EL LA BENGALIA LINGVO. TRADUKIS ILIN TRE BONE S-RO SINHA. LA RAKONTOJN TAGORE VERKIS INTER 1895-1900. MI SURPRIZIĜIS ĈAR ONI FACILE LEGAS ILIN, SED TIU FACILECO ĜENAS AL ESPRIMADO DE GRAVAJ TEMOJ. VENKAS, TAMEN, ILIA ĈARMECO KAJ KOMPATECO EKDE LA KOMENCO ĜIS LA FINO, KAJ ONI BEDAŬRAS KE ONI NE PLUE POVAS LEGADI PRI LA MISTEROJ DE LA HINDA KULTURO KAJ STRANGAJ RAKONTOJ INTER LA DIVERSAJ GENTOJ DE TIU MALPROKSIMA MONDPARTO. PLEJ INTERESAJ ESTAS LA HOMOJ PRISKRIBITAJ. TAGORE VERKAS TIAMANIERE, POR KE ONI SENTU KAJ KONU LA KOROJN DE LA HOMOJ, ĈU MALJUNAJ, ĈU JUNAJ, ĈU BONAJ, ĈU MALBONAJ, KAJ ĈIU UNUOPULO HAVAS ETERNAN ANIMON, KIUN ONI SENTAS KIEL NEAPARTIGEBLAN ERON DE ONIA PROPRA SPIRITO.

— EUGENE G. CALVERT

* * * * * * * *

## LA HEBRELINGVA MOVADO

LA FEBRUARA ELDONO DE LA JEN-BULTENO ENHAVIS TRE CELTRAFAN ARTIKOLON DE WALTER STOCK, KIU PRISKRIBAS LA NUNTEMPAN MOVADON POR PLIVIVIGO DE LA GAELA LINGVO. LA IRLANDLINGVA MOVADO MULTE SIMILAS AL LA MOVADO INICIATINTA EN LA KOMENCAJ JAROJ DE LA NUNA JARCENTO KIU CELIS LA REVIVIGON DE FAKTE MORTINTA LINGVO: LA HEBREA. ĜIS NUN TIU KLOPODADO JAM ATINGIS BONAJN REZULTOJN.

EN LA KOMENCIĜO DE LA JARCENTO, TRE MALMULTAJ JUDOJ LOĜIS EN PALESTINO. LA PLIMULTO DA ILI LOĜANTA EN JERUSALEMO, UZIS LA JIDAN EN ORDINARAJ INTERKOMUNIKADOJ, KAJ LA HEBREAN NUR POR PREĜI. TIUJ JUDOJ, LA TRADICIISTOJ DE LA MEZEPOKAJ JUDAJ SEKTOJ, KIUJ NASKIĜIS EN PERIODO DE SUBPREMO DE ĈIO JUDECA, OBSTINE TIAM, KAJ ILIAJ POSTULOJ OBSTINE NUN, RIGARDIS LA HEBREAN KIEL SANKTAN LINGVON, KAJ NETAŬGAN POR ORDINARA UZO.

SED GRAVA INSTIGO AL PLI VASTA UZADO DE LA LINGVO FARIĜIS LA CIONISTA MOVADO, KIU CELIS LA REATINGON DE LA ANTIKVA JUDUJO. ĈAR EKFLUIS KELKAJ NOVULOJ EL DIVERSAJ LANDOJ EN PALESTINON, EKFLUIS TIEN ANKAŬ LINGVA ĤAOSO. VIDANTE LA KERNON DE GRANDA KONFUZO KAŬZE DE TIO, JUDA "PIONIRO," ELIEZER BEN JEHUDA EKLABORIS POR REVIVIGO DE LA HEBREA LINGVO KIEL PAROLATA LINGVO LIGANTA ĈIUJN JUDOJN. LA ELDONO DE LIA "VORTARO DE LA HEBREA LINGVO" OKAZIS POST SENĈESA PORHEBREA PENADO.

NUNTEMPE LA HEBREAN ONI UZAS EN ISRAELO KIEL UNU EL LA TRI OFICIALAJ NACIAJ LINGVOJ (KROM LA ARABA KAJ LA ANGLA), KAJ LA PLEJMULTO DE LA ENLOĜANTAR* PAROLAS, LEGAS KAJ SKRIBAS ĜIN. LA MOVADO TIE BONE SUKCESIS.

TIU VENKO, TAMEN, NE SUFIĈAS LAŬ OPINIO DE TIUJ, KIUJ PROMOCIAS LA HEBREAN LINGVON ANKAŬ EKSTERISRAELE, POR INTERJUDAJ KONTAKTOJ. UNU EL LA ORGANIZAĴOJ EN USONO KIUJ HAVAS TIUN CELON ESTAS LA HISTADRUT IVRIT OLAMIT (MONDHEBREA FEDERACIO), 120 WEST 16 ST., NEW YORK CITY, N. Y. JAM DELONGE LA JIDA LINGVO FARIĜIS MORTONTA AFERO. POVAS ESTI, KE LA HEBREA PRENOS LA POZICION DE LA "ESPERANTO DE LA JUDARO."

— AJEFO

* * * * * * * *

## INFORMO PRI LA ELNA/JEN KONGRESOJ

LA KONGRESOJ DE LA ESPERANTO LIGO DE NORD-AMERIKO KAJ LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORD-AMERIKO OKAZOS ĈE LA PICK-ROOSEVELT HOTEL EN PITTSBURGH, PENNSYLVANIA, 4 - 7 JULIO, 1963. ĈIUJ JEN MEMBROJ ESTAS INVITITAJ!!

LA ELNA/JEN KONGRESA KOTIZO (NUR POR JEN MEMBROJ) ESTAS $5. TIU ĈI PREZO DONAS AL LA JEN-KONGRESANO LA RAJTON PARTOPRENI EN ĈIUJ ELNA KAJ JEN AKTIVECOJ, DISKUTOJ, KTP, TRA LA 4 TAGOJ. ANKAŬ, TIU CI KOTIZO INKLUZIVAS GRANDAN BANKEDON EN LUKSA CAMBREGO, MULTAJ DISTRAĴOJ, KAJ ALIAJ AFEROJ.

LA HOTELA PREZO, POR 3 TAGOJ (3 NOKTOJ) ESTAS $10.50 (3 PO ĈAMBRO).

ALIĜILON NI BALDAŬ SENDOS AL VI!

## PREZ-LISTO DE KELKAJ LEGINDAJ ESPERANTAJ LIBROJ - - -

| | |
|---|---|
| BILD-LIBRO PRI BESTOJ - GETHING, CAPP, BUTLER; 80 P., BIND ..... | $2.60 |
| DEKKINGA FUĜAS - TJEERD ADEMA; 220 P. .......................... | 1.90 |
| EZOPA SAĜO - K. KALOCSAY; 124 P., BIND. .......................... | 1.50 |
| FERIO KUN LA MORTO - K. LINDQVIST; 72 P. .......................... | .75 |
| FERMENTARIO - CARLOS VAZ FERREIRA; 262 P., BIND. .................. | 4.35 |
| JUNAĜA VERKARO - E. PRIVAT; 143 P. .............................. | 1.40 |
| LANDOJ DE L' FANTAZIO - T. JUNG; 323 P., BIND. .................. | 1.65 |
| LA MAR-VIRINETO - H. C. ANDERSEN; 78 P., BIND. .................. | 2.40 |
| MISTEROJ DE L' VIVO - BOGH-HOGSTED; 100 P. ........................ | .80 |
| MOREA PERLO - D. SIMSON; 223 P. .................................. | 1.00 |
| NOVAJ ESPERANTO-HISTORIETOJ - DIVERSAJ AUTOROJ; 72 P. ............ | .75 |
| PINTA KRAJONO - RETO ROSSETTI; 130 P. ............................ | 1.20 |
| PLUK - POUL THORSEN; 96 P. ......... ........................... | .80 |
| SEKRETOJ DE LA MAR-ESTAĴOJ - P. GIUNIO; 144 P. .................. | 1.60 |
| SUR INSULO MALPROKSIMA - J. VAN HEMERT-REMMERS; 79 P. ............ | .90 |
| VAGABONDO KAJ SINJORINO - W. KLOEPFFER; 204 P., BIND. ............ | 1.00 |

ĈIUJ LIBROJ AĈETEBLAJ ĈE:

ESPERANTO LIBRO-SERVO DE JEN
P.O. BOX 315
BROOKLYN 11, NEW YORK